

## Gvidilo por renkontiĝoj

Ni pensas ĉefe pri renkontiĝoj por studentoj aŭ lernantoj de la lingvo, ĉu en enlanda ĉu en internacia medio. Evidente, necesas adapti la konsilojn al la aĝkategorio de la partoprenantoj. La celo de la gvidilo estas kreskigi la kvankon de efektiva komunikado en Esperanto kaj la rapida starigo de Esperanto-lingva ĉirkaŭaĵo.

Bonvenigaj vortoj estu en Esperanto, eĉ se tradukado necesas. Same la ĉiutagaj informoj, instrukcioj kaj ekskursaj klarigoj. Tio validu eĉ se instruisto alparolas sianaciajn studentojn.

Ĉiutage okazu paroligaj ekzercoj kun lingve miksitaj grupoj. Grandparte temu pri etaj grupoj, tiel ke ĉiu havu ŝancon paroli. Estu bone difinitaj taskoj, kun ludecaj interkulturaj aktivaĵoj, por ke oni ne sentu ke “ni reiras al la lernejo”.

- ekzercoj, komunaj temoj, verba ekzercado
- prezento kaj dirado de frazoj reale uzeblaj dum la renkontiĝo
- rol-ludoj, kunlaborigaj ludoj
- uzu desegnadon aŭ aliajn artismajn projektojn, sed akompane kun lingvo-uzado

En vesperaj kaj distraj programoj, ekzemple en diskoteko, aŭdigu ankaŭ modernan Eo-muzikon, por ke oni konsciu pri ĝia ekzisto kaj kvalito kompare al nacilingvaj alternativoj.

Laŭeble multe aperu ŝildoj en Esperanto en la kursejo, por ke tiuj vortoj preskaŭ senkonscie lerniĝu.

Venigu personojn, kiuj povas utile kontribui al la programo, sed rigore nur Esperanton parolos, ekzemple, kiuj ne dividas komunan lingvon kun la partoprenantoj (aŭ povas konvinke ŝajni tion).

Kunlaborantaj ne-esperantistoj (ekzemple gepatroj de studentoj) ricevu bazaj informojn pri Esperanto kaj rapidkurson (antaŭ kaj dum la aranĝo) por ke ili iom komprenu kaj helpu al starigo de la E-etoso en la aranĝo.

Proponoj por ampleksigo de ĉi tiu gvidilo estas bonvenaj.